

1921-01-20-sergeant-fousek_1

Kara samideano,

mi volas al Via afabla maŝinskribita letero de la 2a de t.m. & ankaŭ la viaj du p.k. senditaj ĉirkaŭ Kristnasko. Mi iom atendis por skribi al vi unue, ĉar mi estis tre okupata, due, ĉar mi ne volas devigi vin ĉiam peti mian pardonon pro via prokristo en viaj respondoj.

Do, mi pensis ke se mi iom prokrastis ankaŭ tiel maniere, vi ne sentos vin devigata respondi tuj. Ĉar mi opilas ke nia korespondado nur povas ekzisti se ĝi estas plezuro & neniam ĝi devus esti devo.

Mi gratulas vin pro via bonmaniere skribmaŝino sed, mi konfesas ke mana skribo pli parolas al mi ĉar ŝajnas ke estas iom persona & individua. Maŝine estas, povas esti la skribado al iu ajn. Sed, se vi pli ŝatas skribu tiele, faru tion. Dum la milito kiam mia edzo estis en la „état.major“ li skribis longegajn leterojn al mi, ĉiutage maŝine. Mi al kutimiĝis & post kelka tempo tio plaĉis al mi. Estas vere

1921-01-20-sergeant-fousek_2

ke mi faris same& ĉiu matene dum 2 horoj , mi ankaŭ skribis maŝine al li.

En mia lando (& eble en ĉiuj landoj mi pensas) estas kutimo festigi la 12a nokte, la novan jaron.

Ni tri estis invitataj ĉe Angloj kiu loĝas tie & ludis „bridĝon“ kaj poste ni dancis. Ĉu oni dancas multe ĉe vi? En Anglujo & Francujo estas frenezo. Oni dancas la tutan tempon precipe en grandaj urboj. En Boulogno nur dum la somero en la Kasino sed ĉie oni dancas la novajn dancojn. Les lanciers, le quadrille, la mazurka, la schottische k.t.p. tute ne estas konataj de la juna generacio. Estas la „one-step“, la foxtrot, le tango, k.t.p. Mi konas ĉiujn sed ĉiu dancanto dancas ilin ali maniere & estas iom malfacile kiam oni ne konatiĝas. Mi dancis en preskaŭ ĉiuj landoj eŭropaj & rimarkis ke la Rusoj ĉiam turniĝas dancante. Tie, oni marŝas irante direkte preskaŭ ĉiam & oni turniĝas malpli ol ĉe vi.

Tie ni devas pagi skribmaŝine ĉirkaŭ 1200 frankojn. La nia estas de „Oliver“. Kaj ĝi havas ĉiujn supersignitajn leterojn en la bona maniero.

Kion Via bofrato pensas pri la vivmaniero en la malnovaj landoj, nun kiam li pasigis tiom da jaroj en Ameriko. Ĉio sendube ŝajnas antikva, primitiva. La vivo Amerika & Angla estas tiel malsimilaj al aliaj landoj

1921-01-20-sergeant-fousek_3

Ni ĝojas ke la Kongreso okazos la 31-an de Julio ĉar mia edzo deziras esti en Boulogno por la Internacia Tenisa Kongreso kiam venos Suzanne Lenglen la nevenkebla ludantino en Septembro. Mi kredas ke ekzistas vagonaro direkte de Boulogne al Praha. Se ĝi ne estas tro kosta, tio estas tre oportuna al ni, ĉu ne?

Kvankam ĝi estus tre laciganta & mi ŝatis resti en Svisujo, irante al Praha.

Dankon por viaj informoj pri la banlokoj pri reŭmatismoj. Mia edzo tute resaniĝas & nur suferos pro tro grandega laboro.

Mi ŝatus viziti Přebrouč, certege, sed estus tiom da lokoj, tiom da vidaĵoj kiujn mi ŝatus vidi, ke ne estus eble fari ĉion kion mi dezirus.

Mi plendas vin, pensante al via teruro en sur ŝipo, ĉar mi estas ĉiam malsana – sed mi ŝategas vidi la ondegajn & aŭdi la ventegon – sed nur vidante.

De post du tagoj, uragano ventegas tra mia regiono. La grandegaj arboj en mia bulvardo kliniĝas & ŝajnas kvazaŭ ili devas rompiĝi.

La bruo, la bruego estas kiel tondro, kiel paflego,

1921-01-20-sergeant-fousek_4

oni ne scias marŝi, oni ŝajnas esti malgrandaj etoj meze de la elementoj, sen iu ajn volo por la direktado. Malfeliĉaj maristoj! Posttagmeze mi iras ĉe s-ino tute apud la maro kie ni ludos kartludon „bridge“ (kiun eble vi konas. Estas la kartludo moda de post 10 jaroj. Estos 4 aŭ 5 tabloj & la ludoj estos eliminaj & la 2 lastaj gajnontaj havos premiojn.

Ĝenerale oni ludas por la mono – sed tre malmulte.

Ne imagu ke mi nur faras kartludojn en mia vivo. Tute kontraŭ. Ĝenerale mi malamas la kartojn. Escepte la „bridĝon“. Mi estas okupata dum la tuta tago je tiel diversaj okupaĵoj!!! Kuirado, purigado, maŝinskribado, sekretario de mia edzo, kudrado, pentraĵo, iom (tre tre malmulta da muziko), multe da legado da eliro, korespondado, zorgado ĝenerala monaj kalkuloj – vizitoj – k.t.p. Mi ne povas doni detale al vi mian vivon ĉar mi timas ke ĝi tute ne interesigos vin, sed mi nur dezirus ke tagoj estuj je 24 horoj ol je 12 horoj.

Mi tute esperas ke la nazkataro de via edzino & nevino & de vi tute resaniĝis, & ke vi bone ... dormis tiun dimanĉon. Mi havas tute fortan imagon & image mi povis vidi vin & ilin legante (Kion vi legis?) Ĉu vi ne povas desegni vian domon aŭ oficejon por ke mi vidu kiel ili estas. Mia

1921-01-20-sergeant-fousek_5

imago ne tiel vagante irus & mi pli vere havus bonan ideon de la vera domo & oficejo k.t.p. de mia malproksima korespondanto.

Mia filo reiris al la Universitato antaŭ 3 semajnoj en Lille (je 4 horoj en vagonaro de Boulogno) kaj li revenos vendredon proksiman ĝis lundon. Mi ĝojos revidi ĉar junulo, kiel li mankas en hejmo.

Li & mi estas kvazaŭ gefratoj & mi ludas je ĉiuj liaj ludoj kun li. Kiam ni iras en balojn, ĉiam li dancas kun mi.

Ĉu estas same ĉe vi kiel ĉe ni & en Ameriko & en Anglujo pri komerco? Mi parolas pri la ĝenerala pli malgranda kosto de la vivo.

Sendube, ĉio iom (?) (tre malmulte) malpli kostas. Sed ĉiu atendas ke ĝi malpli kostas ankoraŭ & neniu aĉetas...& atendas.

Konsekvence, la komercistoj perdas & vendas perde, kiam ili vendas. Sed tamen la monŝanĝo pli & pli altiĝas kun Anglujo & Ameriko. Kial do? Estas nun la 14a horo & mi devas vestiĝi por tiu posttagmeza festo & mi forlasos vin dum kelkaj horoj. Kion vi faros dum tiuj horoj? Laborojn por klientoj

1921-01-20-sergeant-fousek_6

eble? promenadon sur la kampajaj vojoj eble? Legadon apud via fajro, eble, via edzino kuranta apud vi. Vi vidos kiel mia imago vagadas. Do, mi forkuras lasante meze de viaj okupadoj. Ĝis la revido, eble vespere, eble morgaŭ matene. Jen la suno sin montras por ke mi havu bonan promenadon ĝis la maro.

Mi nur ŝanĝos robon por pli ceremonian robon, mi purigos miajn manojn, k. t. p. & post 20 minutojn, mi kuraĝos ataki la ventegon..., sed mi tiel ŝatas puregantan venton.

Aurevoir...á brentot.

Jen mi eniris & vespermanĝis & skribis anglan leteron por mia ezdo. Nun mi revenas al mia letero. Mi iris & revenis piede el la maro. Tramveturilon mi ne vidis & mi ne ŝatis bendi ĝin. Mi vidis la „tendarojn“, ŝipojn kiuj kunportas la vojaĝantojn ĝis la grandegaj ŝipoj kiuj iras Amerikon, tute pretajn por la eliro. Ili estis tre belaj kun siaj lumoj kiuj rebrilis en la akvo malkvieta. La ŝipegoj ne estas en la haveno mem. Iom pli malproksime sed tamen en kvietaj akvoj. Nun, vento falas & eble mi pli bone dormos tiun nokton.

Do, kara samidealano, mi forlasas vin dezirante al vi bonan nekton, belajn songojn & esperante tre baldaŭan respondon se tio ne malplaĉos a lvi.

Amike & samideane A. Sergeant

Salutojn al via edzino & al via nevino